

# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago

№11, Novembro, 2008

*Kara Leganto! Hodiaŭ ni havas numeron, riĉan je novaĵoj de la tuta mondo. Nia prezidanto V. Pajuk vizitis sian gepatran landon – Ukrainion, kaj prelegis pri la historio de ĉefurbo Kijivo kaj pri interesaj renkontiĝoj kun E-istoj en Kijivo kaj Ternopilo. Sed pli bone legu la suban artikolon.*

Araneo

## UKRAINIO EN MIA KORO

Se pasintjare mi pasigis ĉ. 10 tagojn en mia gepatra urbo Ternopilo, ĉi-jara vizito estis dividita je tri partoj: mi alvenis al Kijivo, poste pasigis semajnon en Ternopilo, kaj denove Kijivo kaj forflugis al amerika kontinento. Kijivo estas urbo kun pli ol 1500 jara historio. Laŭ legendo ĝi estis fondita en VI jarcento fare de tri fratoj Kij, Ŝĉek, Ĥoriv kaj ilia fratino Libid'. La urbo situas sur ambaŭ bordoj de grandega rivero Dnipro, super abunda verdaĵo oni povas ĝui la belecon de oraj preĝej-pintoj, konstruitaj en diversaj stiloj.

Ankaŭ la historio de la loka E-movado (vidu Saluton 03.2005) estas interesa: la unuaj lokaj E-istoj estis menciitaj en la unua E-listo de Zamenhof, tie ĉi okazis en 1912 Kongreso de Rusiaj E-istoj. Nun en la urbo agas kelkaj E-kolektivoj, la plej fama estas, sendube, “La Ora Pordego”. Kaj antaŭ nelonge en la urbo ekfunkciis “La bonfara fonduso “Espero” nome de V. Eroŝenko”. La Fonduso disvastigas sciojn pri V. Eroŝenko (vidu Saluton 2004, 12) kaj popularigas lian nomon. Omaĝe al 92-a Kongreso de UEA en Jolohamo la fonduso helpe de la plej bonkvalita moderna monerproduktanta uzino de Eŭropo – Banknotmoneta domo de la Nacia Banko de Ukrainio – emisiis 31-milimetran moner-medalon



el nejzilbergo. La fonduso ankaŭ kontribuis al studentoj de supera lernejo prepare disertaciojn pri E-o. En siaj planoj la fonduso antaŭvidas kelkajn ĉi-temajn eldonojn, strategiajn diversdirektajn informajn paŝojn, dediĉitajn al V. Eroŝenko. Antaŭ nelonge la fonduso eldonis kolekton de E-tradukoj de la plej abunda ukraina poeto, tradukisto, scienculo Ivan Franko (vidu Saluton 10.2006). Pri la libro ni skribos aldone, baldaŭ. Dume, rigardu la foton kun skulptaĵo de V. Eroŝenko sidas E. Kovtonjuk (prez. de la fonduso), staras V. Taranjuk (direktoro) kaj V. Pajuk (prez. de E-Ŝikago).

## UEA NOVAĴOJ

Universala Esperanto-Asocio, nova asocia membro de ALTE, Asocio de Lingvistoj en Eŭropo, estis invitita prezenti sin dum ties internacia konferenco en Lisbono de la 12-a ĝis la 15-a de novembro. Kiel reprezentanto de UEA partoprenos Zsófia Korody. Apud la celoj, strukturo, agado, k.a. apartaĵoj de nia monda organizaĵo, specialan atenton ricevos la nova ekzamensistemo ellaborita surbaze de la Komuna Eŭropa Referencokadro (KER) kunlaboro kun la Hungara Ŝtata Ekzamencentro (ITK). Zsófia Korody raportos al la diverslingvaj fakuloj per detale ellaborita projekciado kaj prezentos specimenojn el la Esperantlingva testaro. La reprezentanto de UEA partoprenos ankaŭ en kelkaj fakaj laborgrupoj, interalie en tiu pri la lingva testado de infanoj kaj junularo.

**Avo Frosto** respondas en E-o! Kristnasko 2008 alvenas kaj plurcentmiloj da infanoj en la tuta mondo skribos al Avo Frosto. Jam delonge, Avo Frosto kutimas respondi en la franca, la angla kaj en dudeko da aliaj lingvoj, sed ekde 2002, la norda saĝulo ankaŭ lernis E-on. Ni invitas ĉiujn E-istojn, junajn kaj junkorajn, malkovri tiun tradicion, skribante al Avo Frosto. Simple sendu manskribitan leteron al la adreso: AVO FROSTO – NORDA POLUSO, KANADO, HOH OHO P.S. La poŝta kodo estas vera kaj grava parto de la adreso. Ĝi estas rezervita al Avo Frosto.

## EL NIA LETERKESTO

1 Mi korsalutas vin. Mi volas, ke vi konu pri miaj esperantaj agadoj ĉe Urbana-Champaign. Bedaŭrinde, mi ankoraŭ ne iniciatis la E-grupon, sed post miaj finaj ekzamenoj mi faros tion. Lastatempe, mi trovis samideanojn kaj ekinstruis E-on! Mi ĝuus aniĝi al la UEA kaj Esperanto-USA por la venonta jaro kaj mi ne povas atendi ricevadon de E-revuo! Ankaŭ, mi trovis multmulte da E-libroj en la biblioteko de mia universitato. Mirinde! Ankaŭ, (hehe) mi esperas, ĉu mi, kaj eble unu aŭ du el miaj geamikoj, povus ĉeesti vian Zamenhofan bankedon ĉi-jare? Tio tre ĝojigus min. Amike, Darsi

2. Karaj geamikoj, vi scias ke post la morto de mia edzino Maria mi fartas malbone. Ŝi malsanis dum unu jaro kaj tiel mi ne povis ĉeesti niajn kunvenojn. Dimanĉe mi forvojaĝos al Arizona por ripozo. Estos la unuafoje, kiam mi ne povos ĉeesti la Zamenhofan Kunvenon. Mi deziras bonan sukceson. Amike, via Walter Cebulski



94-a Universala Kongreso de Esperanto  
25.07-1.08.2009  
Bjalistoko, Pollando

## Jen la informo pri niaj sekvantaj kunsidoj:

25an de Novembro – Esperanto en ne-movadaj revuoj, preparis G. Dolgin

14an de Decembro – Zamenhofa Tago, BANKEDO

27an de Januaro – Henry Dunant, samtempulo de L. Zamenhof

## Adreso (provizora)

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktor Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
[www.esperanto-chicago.org/](http://www.esperanto-chicago.org/)

## Estraro:

Prezidanto – Viktor Pajuk  
Vicprezidanto – d-ro Puramo Chong  
Eksprezidanto – Roberto Stalzer  
Sekretario – Gertrude Novak, MD  
Kasisto – Karlo Gunn

## MEMBROKOTIZO

Membro-subtenanto ; \$40 jare;  
Familia membro : \$30, Regula: \$20  
Studenta aŭ pensiula: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,  
Charles Gunn, 828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607

## KUNSIDO

**okazas kutime la kvaran mardon  
de ĉiu monato  
en:**

Sulzer Public Library, 4455 N.  
Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.  
Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda  
Konferenca Salono, unua etaĝo.

